

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond nome de Svisa Radio Internacia.

Ni alproksimiĝas al la somera sesio de Internacia Feria Altlernejo en La Chaux-de-Fonds kaj ni donas al vi la liston de la okazontaj kursoj kaj seminarioj. Ili disvolviĝos ekde la 30-a de junio ĝis la fino de la monato aŭgusto.

A.- Kurso No 1 : Participaj sufiksoj en esperanto. Instruos Gerard Cool, nederlandano, matematikisto kaj muzikisto, eksinstruisto en internacia gimnazio en Svislando. Post multaj legadoj kaj diskutoj pri la participa lingvouzo esperantlingva la instruonto alvenis al la konkludo, ke la malsama lingvouzo inter la at- kaj it-emuloj altgrade fontas el imitado de la nacilingvaj uzoj, multe pli ol el analizado de la esperanto-strukturado. Tial ambaŭ skoloj vane provas konvinki unu la alian. La instruonto provis ellabori analizon de la uzodiferencetoj kaj per ĝi kompromisan akordiĝon. La kursontoj estu spertaj esperantistoj, kiuj interesiĝas pri strukturdemandoj.

Cl.- Kurso No 2: Sistemoj de muzik-notado: La nuna kaj alternativaj, nome Klavar-skribo. Eventuale kvanta analizo de intervaloj (tonskaloj), pura kaj temperita. Instruos Gerard Cool. Kvankam ne profesia muzikisto la instruonto okupiĝas pri muziko, precipe klasika kaj folkloro, ekde la 8-a jaraĝo. Li sekvis kursojn pri pian- kaj violon-ludo, antaŭ ol fakiĝi pri koncert- kaj bek-flutado, kiujn li instruas. Interesiĝos muzikistoj, muzikantoj kaj matematikistoj.

A.- Kurso N3: Cseh-Seminario, grado A (enkonduka) por pedagogoj, intensa. Instruos Audrey Childs-Mee, kunlaborantino de Internacia Esperanto-Instituto (IEI), aŭtoro de la lernolibro *Saluton! Esperanto aŭtodidakte*. Reprezentos Kulturan Centron Esperantistan kaj ties Modernan Cseh-Metodon Stefano Keller. Organizas Mila Van der Horst-Kolinska, administranto de IEI. Aliĝo eblas ankaŭ tra KCE. Al ĉi studsemajno aliĝu personoj kun bona lingvoscio, dezirantaj instrui laŭ la Cseh-Metodo. En la teoria parto pritraktiĝos la principoj, reguloj kaj ecoj de la Cseh-Metodo kaj la postuloj por la instruanto. La praktika parto ebligos observadojn kaj prov-instruadon. La paralelan esperanto-staĝon por komencantoj kaj progresantoj gvidos Claude Gacond.

Cl.- Familia feriado, unua parto kun seminario pri esperanto en familio. Organizos kaj gvidos Stefano Keller kaj Karola Watters, usonanino, studento pri lingvoj kaj pedagogio, kune kun aliaj edukistoj kaj pedagogoj. La du semajnoj ebligos esperantujan feriadon al internaciaj esperantistaj familioj, kiuj povos pliperfektigi lingve, interŝanĝi spertojn pri plurkultura kaj plurlingva familia vivo. Samtempe disvolviĝos esperanto-staĝo por komencantoj kaj progresantoj, kiun la gepatroj povos partopreni. La gefiloj kaj la aliaj infanoj havos diversajn aktivecojn, lernos, praktikos esperanton kun siaj aĝkunuloj sub la gvido de edukistoj. Dum la semajnfino okazos seminarioj pri la familia lingvouzo. La seminariantoj listigos kaj pritraktos temojn, kiuj koncernas la vivon de familio ĉu interetna, ĉu sametna uzanta esperanton kiel familian lingvon. Oni studos la fenomenon el vidpunktoj lingvaj, pedagogiaj, psikologiaj kaj sociologiaj. Dum la seminario estos prezentita proĵekto de porfamilia rubriko en *Monata Cirkulero*. Eblas partopreni la seminarion sen ĉeesti la tutan familian feriadon antaŭ aŭ post ĝi.

A.- Kurso No 4. Kiel esperanto kaj ties movado kaj literaturo evoluis dum sia unua jarcento. Instruos d-ro Istvan Szerdahelyi, hungaro, profesoro de esperanto kaj lingvistiko ĉe Universitato Eötvös Lorand en Budapeŝto, verkisto, metodologo, prezidanto de ILEI. Enironte la duan jarcenton de esperanto ni ŝatus intimiĝi kun la ĉefaj evolu-tendencoj, kiuj karakterizas ĝin ĉiurilate. Ni ne povos trovi pli kompetentan gvidanton por tiu ĉi studo, kiu rigardigos nin ne nur al la lingvo mem, sed ankaŭ al ties parolantoj, verkistoj, organizaĵoj, ktp. 99 jaroj riĉas

je eventoj kaj faktoj, tial estas konsilinde aliĝi al ambaŭ studsemajnoj, se oni volas akiri kompletan komprenon pri la fenomeno esperanto.

Cl.- Kurso No 5 : Kalevala, la grandioza epopeo norda. Instruos d-ro Giorgio Silber, kiu instruis en Finnlando dum pluraj jaroj. Li estas fakulo pri la finn-ugraj kulturoj. Nuntempe prezidanto de la Kooperativo de *Literatura Foiro* kaj konsilisto de redakcioj en Italio, esperanto-verkisto. La kursanoj kunportu aŭ aĉetu ĉe Kultura Centro Esperantista la esperantlingvan *Kalevala*. La legadon de paĝoj el tiu esperanta versio kompletigos projekciado de bildoj de Akseli Gallen-Kallela kaj aŭdiĝo de arioj komponitaj de Johano Sibelius. Kursdisvolviĝo : 1. Elementaj nocioj pri la finna lingvo kaj bazaj informoj pri la historio de Finnlando. 2. La rolo de la finna kulturo en la nordaj mitologioj. Elias Lönnrot kaj la du eldonoj de Kalevala (1835 kaj 1849). La influo de Kalevala en la finna literaturo. La rilatoj inter romantiko kaj Kalevala. 3. La strukturo de Kalevala : metriko kaj enhavo. Unuarangaj epizodoj. 4. Mito kaj psikologio en Kalevala. 5. La naturo, la melodio, la revo. Mondo ŝamana kaj kristana.

A.- Kurso No 6 : Lertiĝo en la tradukarto, el la franca. Instruos Georges Lagrange, franco, kiu estas konata kiel unu el la plej kapablaj nuntempaj esperanto-tradukistoj. Post enkonduko, la kursanoj ekzerciĝos en la arto traduki kaj juĝi tradukojn pere de ekzemploj. Kritikoj kaj diskutoj progresigos ĉiujn. La taskoj, kun kreskanta malfacileco, rilatos al klasika kaj moderna literaturo, al gramatike tipaj frazoj, al tekniko kaj teatro. Kolektivaj ekzercoj donos ideon pri certaj traduk-malfacilaĵoj. Kurso No 7. Lertiĝo en la tradukarto, el la germana lingvo. Enkonduka kurso. Instruos d-ro Dirk Willkommen, germano, profesia tradukisto, metodologo, redaktoro de la revuo *Esperanto Aktuell*. Tiu enkonduka kurso estas por komencantoj, kiuj jam bone regas la lingvon kaj interesiĝas pri la tradukarto. La kurso enkondukas en la problemaron, konsilas pri helpiloj, traktas tradukproblemojn kaj ekzercas elektitajn ekzemplojn kaj ne tro komplikajn tekstojn. La partoprenantoj de tiu enkonduka kurso povos daŭrigi per partopreno en la progresiga kurso.

Cl.- Tri aliaj kursoj konkludos tiun sesion. Unue : Karolo Piĉ, lia verkaro kaj lingvaĵo. Instruos E. Borsboom. Kaj ankaŭ li instruos por la kurso No 9 : Nia esperanto-literaturo en la lastaj jardekoj. Konkludiĝos la tuta sesio per ferio-semajno ; Internacia geografia kaj biologia feriado. Matene disvolviĝos esperanto-kursoj por komencantoj kaj progresantoj kaj prelegoj pri natursciencaj temoj. Prelegos Wim De Smet, doktoro pri zoologio profesoro nuntempe en Butaro, Ruando, Afriko. Seminario pri la nova biologia nomenklaturado konkludos la sesion.

A.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Claude kaj Andrée Gacond raportis pri la someraj kursoj okazontaj en La Chaux-de-Fonds. Ĝis reaŭdo !

-oOo-